



Esperanto-Informilo



Foto de nekonatulo: la 1-an de aŭgusto 2026: "Konataj vizaĝoj ĉe Sudtiroler placo en la kongresurbo Graz, Austrio.

Mesaĝo de la prezidanto: La UK en Graco estis vere vizitinda evento, ne nur pro la belega urbo, sed ankaŭ pro la kongresejo, kiu troviĝis mezurbe en majesteca palaco kun grandaj klimatizitaj salonoj – kaj tiu fakto estis ege bonvena, ĉar eksteren tagmeze estis malagrabla varma. La ununura menciinda manko miaopinie estis la maloftaj seĝoj en la konstruaĵo, kaj la pompaj brakseĝoj krome ne estis moveblaj. La interna kafejo ofte estis plenplena – pro tiu multaj Esperantistoj ne restis sed vizitis najbarajn restaŭraciojn aŭ kafejojn por ĝui aŭstriaĵojn frandaĵojn kaj interbabili.

Mi deziras belan septembron,
G. Hennemann

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:

Georg Hennemann

Ulrich Fellmann

Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann

Rehgartenstrasse 16

35683 Dillenburg

Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: BE92 9051 1007 7223

BIC: TRWIBEB1XXX

bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Unua mardo

La 1-an de septembro 2026

“Elsendo de E-Informilo”

Dua mardo

La 8-an de septembro 2026

ekde la 19-a horo: Interna babilado per Jitsi

Ligilo: <https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 15. September, 2026 --- Mardo, la 15-an de septembro, 2026

18:30 h Lingva rondo

“Tiernamen in Esperanto” - “Bestonomoj en Esperanto”

W. Ullmann

19:30 h

Vortrag Prelego

“Über das Violincello” - “Pri la violonĉelo”

E. Bünemann

Kvara Mardo

la 22-an de septembro

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“

Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

Anoncoj: Internacia Renkontiĝa Festivalo sur Pacplaco en Darmstadt

Al la Gefrankfurtanoj.

La urbo denove ripetis sian inviton, ŝajne ne estas multaj aliĝintoj...

Salutas Detlef

La urbo Darmstadt denove okazigos „Internationales Begegnungsfest“ sur Friedensplatz (apud la palaco) kiel en la lastaj jaroj. Esperantistoj el Darmstadt denove partoprenos per propra informbudo. Ĉi-foje ni havos kunan tendon (duoblan – 3*6m) kun „Originalfreundeskreis der Partnerstädte Darmstadts“ – nia kutima partnero en kunlaboro pri ĝemelurboj. Laŭ la lastaj informoj la Begegnungsfest okazos:

„Internationales Begegnungsfest“

Sabate, 26a de Septembro 2026, sur „Friedensplatz“ 12-18a horo,

ekkonstruado antaŭ ol 10h necesa (nur por la loka grupo)

Ankaŭ grava informo: samtempe faŝistoj planas „Nationales Reichsbürgertreffen“ sur vere apuda placo (Karolinenplatz). La urba administracio verŝajne ne povas malpermesi tiun. Do, ni devas des pli forte montri nian internaciecon!



Foto de la tago, sendita de U. Fellmann, 28-an de aŭgusto. „Intensaj kontrastoj de vespere malleviĝanta suno.“

Ĉu Frankfurto taŭgas por gastigi UK-on ?

Eseo de Georg Hennemann

Mi ne scias kiel vi mem pensas pri la ideo gastigi universalan Esperanto kongreson en Frankfurto, sed mi jam de diversaj flankoj aŭdis ke estus bona ideo okazigi UK-on post ĝuste tridek jaroj denove en Germanio, ĉar la lasta UK en Germanio okazis en Berlino en jaro 1999. Cetere en la jaro 2029 nia klubo ja ekzistos jam 125 jaroj kaj tiu dato estas kialo por memori kaj solene rememori kune kun multe aliaj Esperantistoj. Jam la unuj proponoj tiurilate estas diskutataj en nia telegrama grupo: Ĉu okazigi la kongreson nur en Frankfurto, aŭ eble ankaŭ taŭgas aliaj apudaj lokoj. Kompreneble la internacia flughaveno estas grava plusa punkto kiu parolas por Frankfurto, sed ankaŭ la areo ĉirkaŭ Wiesbaden/Majenco kaj la tuta rejn-majn regiono certe taŭgas, ne nur por kongresumi, sed ankaŭ por ekskursoj aŭ por antaŭ- kaj postkongresaj aktivadoj.

Certe la kampuso „Westend“ kun la IG-Farbenhaus kaj la apuda Grüneburg parko estus unu taŭga loko por okazigi tiom grandan kongreson, malgraŭ ĝi estas iom for de la urbocentro. <https://campuslocation-frankfurt.de/standort-campus-westend/>. La konstruaĵo mem havas kelkajn grandajn salonojn, kaj la apuda Aŭditorio „Audi Max“ posedas pli ol 1200 sidlokoj – verŝajne sufiĉe por tutkongresaj eventoj kiel solena malfermo kaj fermo. Komencis jam diskutoj en nia telegramgrupo kaj vi estas kore invitata kontribui kun via ideoj tiurilataj. En la venontaj klubvesperoj certe estas okazo plu diskuti tiun ideon kaj se la plimulto de ni konsentas kaj pretas partopreni en Loka Kongresa Komitato, ni kiel la loka Esperanto klubo povus jam ĉi-jare kandidatiĝi por nia urbo Frankfurto ĉe UEA. Do kiun mi volas diri estas ke kandidatiĝo dependas de multaj faktoj kiujn ni mem povas influi. Ekzemple en la venontaj kongresoj en la urboj Melburno kaj Kaŭno estus grave ke kelkaj de ni ĉeestos por prezenti, inviti kaj reklami por Frankfurto kaj la regiono. Mi ĝojas kaj esperas ke ni havu riĉaj kaj fruktodonaj diskutoj kiuj ankaŭ vigligas nian kluban etoson. Aŭ kiel nia amiko Ruben Fernandez skribis en nia telegram-grupo: „Kvankam mi nek estas frankfurtano nek povas helpi, tre ĝojigas min ĉeesti fruajn diskutojn por prepari UK'on, ĝi estas bona ekzemplo de la vigleco de Esperantujo“.

Do estas ja espero ke ni atingu nian celon, kaj pri espero la Esperantisto Wolfgang Günther el Kassel en norda hesio kompilis belegan eseon kiun mi prezentas kiel kontribuaĵo en la lastaj paĝoj de tiu eldono.

Jeder sollte mindestens zwei Sprachen sprechen - seine Muttersprache und Esperanto.

Vidu ankaŭ la retpaĝo de la esperanta rondo Kassel (eroka) : <https://www.kih-kassel.de/hugo/esperanto/>

Furoriga Kinofilmo de Kristofero Nolano: La Odiseado

de Felmano Ulriko

Antaŭnelonge mi estis en IMAXa kinejo por spekti la supre menciitan filmon. Verŝajne la plej multaj de vi aŭ mem ankaŭ spektis tiun filmon, aŭ aŭdis pri ĝi. Verŝajne multaj de vi ie legis pri tio, ke la filmo estis kaj ege sukcesa, do multe spektita, kaj aldone estis kaj estas tre disputita kaj plu disputata, pro sociopolitikaj kialoj. Aŭ, pli precize, pro akuzoj de historia falsado kaj tiel nomita ŝoŭkismo.

Kial tio? La Odiseado estis kreata eble dum la 7-a jarcento a.K. de supozita verkisto Homero.

Li estis greko vivinta en regiono de nuna Sirio, kaj li kunmetis kaj novformulis diversajn sagaojn de sia tempo surbaze parte de okazoj pli fruaj, parte surbaze de sia fantazio, kiuj ludas en la orienta kaj meza Mediteraneo. La heroo de la rakonto, nome Odiseos, estis greka reĝo, kiu partoprenis la militon kontraŭ la urbo Trojo, kiu daŭris dek jarojn. Odiseos poste ne ŝipveturis hejme, kiel la aliaj grekaj reĝoj, sed dum pliaj dek jaroj navigadis tra la Mediteraneo kaj spertis multajn aventurojn, kiujn tiu filmo montras.



La menciita milito, kiu gvidis al tio, okazis pro kverelo pri la belega grekino Heleno, kiun princo de Trojo rabis, almenaŭ laŭ opinio de la reĝo de Sparto. Li vokis la aliajn grekajn reĝojn por veturi Trojen kaj repreni Helenon, kajaŭ detruai la urbon. Heleno mem ne vere ludis rolon en tiu afero, ŝi estis nura „MekGafino“, simbolo por motivigi tiun militon.

Kio tamen kaŭzis la menciitan kritikon de „ŝoŭkisme motivita historiofalsado“?

Nu, en la filmo, Heleno, la plej bela virino de la greka mondo, estis en la filmo ludita de Lupita Nyong'o.

Jes. Ŝi estas nigrulino. Kaj tion granda parto de la blankulara virosfero trovis neeltenebla historiofalsado. Kaj sufiĉe interese, tiu sama temo estis ankaŭ diskutata en diversaj Esperanto-grupoj en la reto kaj en tujmesaĝiloj en kiuj mi regule partoprenas. Kaj ne nur dekstremuloj kaj masklegoj kritikis tion, asertante ke Heleno estis helhaŭta kaj helhara, kiel priskribite en la verko de Homero. Mi iom serĉis la fontojn, la grekan tekston, diversajn tradukojn, traserĉanta tiun je la priskriboj de Heleno. Kion mi trovis surprizis min mem. Sekve mi montras unun de miaj konversacioj, kiujn mi havis kun unu Esperantisto pri tiu temo.

La diskuto inter mia menciita esperantoamiko (el alia lando) tekstis originale tiel – kaj mi ne volis korekti kaj pliigi ĝin, kvankam oni povintus diri multe pli pri tio. (Mi tamen forigis la nomon de mia diskutopartnero.)

Kun edzino mi nun sidas en IMAX-kinejo spektante la filmon Odisseo de Nolan, kiu en la amaskomunikilaro tre furoras. Ĉar mi kiel infano plurfoje legis la Homerajn sagaojn, mi devis spekti ĝin.

10:58 ✓

Estis bone farite. 15:52 ✓



19:34 ✓

Etoso parte tre mojosis, kvankam ne ĉio kongruis al la epoko. Kaj batalaj agoj ofte mallogikis, kiel en preskaŭ ĉiu filmo, precipe la lasta batalo, por fari ĝin pli longa kaj tensia, kvankam oni ja scias, ke la heroo devas venki.

bearbeitet 19:37 ✓

Tamen mi jam rekomendis ĝin al demandintoj. Kaj avertis, ke ĝi daŭras tri horojn.

20:01 ✓

Sencus fari serion. 21:26

Ulriko

ne ĉio kongruis al la epoko

11

Se kredi opiniojn de fakuloj pri la periodo de historio, "ne ĉio kongruis al la epoko" estas milda komento.

21:28

Por mi ĉefa demando aperanta lige kun la filmo estas: Ĉu la ekranigo de la epoko estas vere necesa? Aŭ almenaŭ tia ĉi ekranigo? Ĉu ĝi donas ion vere novan kompare kun antaŭaj provoj?

21:31

Ĉu vi spektis alian furorfilmon de ĉi sezono "Backrooms"?

21:33

Komence mi taksis la filmon kiel ankoraŭ unu novmodan strangajon, sed poste mi legis artikolon, kiu traktis ĝin el siaspeca vidpunkto kaj ŝanĝis sian opinion.

bearbeitet 21:34

Se kredi opiniojn de fakuloj pri la periodo de historio, "ne ĉio kongruis al...

Kvankam malfacilas decidi pri la "ĝusta" epoko. La kreotempo de la finlaborita kunmetita verko estas taksita al ĉ. -700+-30, sed enhavaj detaloj indikas ke la originalaj rakontoj estiĝis ĉ. 400 jarojn antaŭe. Krome, en preskaŭ ĉiu normala (nefakula) "historia" filmo preskaŭ ĉiam preskaŭ ĉio estas malĝusta, vestaĵo, konduto, lingvaĵo, batalmaniero, ktp. Pro tio tiu kritiko ne vere distingas tiun filmon de aliaj.

bearbeitet 21:41 ✓

Jes. Sed almenaŭ malĝustaj ne estu evidentaj kaj okulfrapaj eĉ por laikoj.

21:44

Jes. Sed almenaŭ malĝustaj ne estu evidentaj kaj okulfrapaj eĉ por la...

Laikoj ofte tute misjuĝas historiajn aferojn, ĉar siaj imagoj kaj scioj venas de tiaj filmoj. Ekzemple, en usonaj vakeraĵ filmoj, vakeroj ĉiam havas revolveron, stetsonan ĉapon, kaj estas blankuloj. En la realo, nenio de tio estis tiel. Se oni montrus vakeraĵfilmon kun nigrulaj vakeroj, laikoj krius "anaĥronismo" kaj "falsiga ŭoŭkismo", tamen, 20 ĝis 30% de usonaj vakeroj estis nigruloj.

bearbeitet 21:50 ✓

Por mi ĉefa demando aperanta lige kun la filmo estas: Ĉu la ekranigo d...

Tiaj filmoj ne estas faritaj pro neceso, sed unue por gajni monon, kaj due renomon. En tiu ĉi okazo mi dirus, ke tiu filmo bonis ankaŭ rilate edukaj celoj, ĉar majoritato de la modernaj homoj neniam legis Homeron, kaj en la plej bona okazo, ili spektis filmon malpli bonan kaj malpli longan. Krome, tiu filmo kaŭzis denove publikajn disputojn pri temoj kiel diverseco. Dekstruloj deklaris la filmon "ŭoŭka" (kion ili uzas kiel negativa etikedo) ĉar Helenino en la filmo estas nigrhaŭta. Kion ajn oni pensas pri tiu decido de la reĝisoro, nomi tiun filmon ŭoŭka sonas strange post kiam oni vidis ĝin. Ĝi estas festo de vireca forto kaj sangaj sensencaj amasaj buĉadoj. Sango kaj honoro estas ĝies altestimataj valoroj.

22:05 ✓

Decido pri elekto de Helenino esti vere ege stranga. 22:11

Eĉ ordinario kiel mi povas proponi unu-du ideojn por ekranigo de la historio, ke ĝi estu originala, donu kreaĵ defion, respondu al aliro de diverseco kaj ne daŭrigu vicon el proksimume deko de aliaj pli-malpli ekranigoj.

bearbeitet 22:13

Parenteze en fino de la pasinta jarcento rusia reĝisoro aperigis ankaŭ ekranigon de la etoso. Nemalbonan laŭ mia gusto.

22:17

En la framo de la filmo, ĝi tute ne kaŭzis al mi sencon de strangeco. La filmo plenas je tre variaj homospecoj, tamen tute tipaj por la regiono kaj tempo. Estas nenioj aziuloj (montri ilin oni vere povus nomi malhistoria aŭ ŭoŭka), la granda majoritato estas "blankuloj" (en la plej vasta senco) kun nigraj haroj kaj ĉiuj helecgradoj de la haŭto, troviĝas kelkaj blonduloj kaj kelkaj nigruloj (kune eble 5%), do, ĉio aspektis miampurte tute aŭtente kaj kredeble.

bearbeitet 22:18 ✓

... kaj nenio greko. Vaste menciata kuriozaĵo de la filmo. 22:20

Krome (se mi ne eraras) pri koloro de haŭto de Helenino oni povas konkludi el la teksto ĝuste.

22:22

Laŭ mia sento tiaj ĉi kreaĵ eksperimentoj pli provokas rasismon ol helpas superi ĝin, ĉar donas multajn kialojn por prirasaj diskutoj ĉe limo de deco kaj instigas rasismajn ŝercojn.

bearbeitet 22:23

Oni ne forgesu, ke tiam, la evoluitaj kulturoj vivis en dekoj da ampleksaj ŝtatoj en la orienta Mediteraneo kaj norde (Asia Minor ĝis Nigra Maro), oriente (durivera lando, norde ĝis Kaspio, oriente ĝis Hindujo) kaj sude de ĝi ĝis hodiaŭa Abesinio. Ili komercis grandskale ĉiujn varojn, inkluzive homojn.

22:26 ✓

... kaj neniŭ greko. Vaste menciata kuriozaĵo de la filmo.

Se paroli pri la nacieco de la aktoroj: tio neniam interesis iun. Indianoj en okcidentaj filmoj estis rolitaj eĉ de germanoj, kaj virinoj estis ĝis post Ŝekspira tempo luditaj de viroj ĉar inoj ne rajtis aktori. Usonanoj ludis germanajn naziojn kaj sovjetiajn komunistojn, kaj inverse. Kial nun en tiu filmo tio estu grava? Jes, britoj ludis Aĥaĵojn/Danaojn kaj Trojanojn kaj devis sian anglan prononci usonece. Sed kial tio nun en tiu filmo estas kritikita? Sed ne, tio ne estas pleje kritikata... homoj kiuj neniam legis Homeron nun vokas "defio" ĉar persono kiu entute aperas 5 minutojn en la filmo havas malĝustan haŭtkoloron. Sed oni ja la veran haŭtkoloron tute ne konas... la Odiseado estis skribita ĉ. 400 jaroj post ekkreado, la historian kernon oni ne scias, sed supozas ke la plejparto estis dum la 400 jaroj inventita kaj aldonita, kaj iu, kiun oni iam nomis Homero, faris el dekoj da rakontoj unun rakonton, al kiu li mem aldonis proprajn inventojn. Homero eĉ ne povis scii la haŭtkoloron de Helenino, kiu eĉ eble estas fantazia figuro. Ne estas eĉ konsento, ĉu Iliado kaj Odiseado estis verkataj de la sama aŭtoro. Kaj... "Ni ne scias, ĉu Homero vivis, sed ni scias, ke li estis blinda". (Kaj pri koloroj li ŝajne neniam skribis, nek pri blua ĉielo aŭ maro, nek ruĝa sango, nek brunaj aŭ bluaj okuloj). Alia ofta, pli ŝerca, frazeologismo: "La Iliado ne estis verkita fare de Homero, sed de iu alia persono, kiu nur nomiĝis tiel".

Laŭ mia sento tiaj ĉi kreaĵ eksperimentoj pli provokas rasismon ol help... Tiaĵoj neniam kreas rasismon, nur malkovras ĝin. Ĉu tio estas bona aŭ ne, pri tio la opinioj malsamas.

22:48 ✓

Krome (se mi ne eraras) pri koloro de haŭto de Helenino oni povas kon... Tion mi foje aŭdis kaj legis, sed neniŭ ie nomis la lokon kaj tekstpecon, kaj neniŭ persono povis al mi diri tion.

Tial mi petis Al serĉi grekajn tekstojn kaj germanajn tradukojn por trovi kion ili diras pri la haŭto, hararo kaj okulkoloro de Helenino. Jen kion ĝi ofertis:

Mezepokaj/tradiciaj priskriboj de Heleno (sed ne rekte en la Iliado mem) klare mencias detalojn pri ŝia "lumo/radiado" kaj ŝiaj vizaĝaj trajtoj - inkluzive de brilaj/brilaj okuloj kaj "hela" aŭ pli hela hararo.

Specifaj vortkombinaĵoj kiuj aperas por hararo, brovoj/okuloj kaj vangoj:

- Hararo/Brovoj: *brileti/brili*
- Okuloj: *"brili tiel hele kiel klara vitro"*
- Vangoj/Haŭto: *Vangoj estas "ĉirkaŭitaj de ruĝo", "ili brilas kiel rozpetalo".*

Tamen, se vi vere celas Homeron/Iliadon en la greka originalo (kaj specifaj versoj): Dum beleco/impresco ofte estas emfazita rilate al Heleno, specifaj kolordetaloj koncerne hararon/okulkoloron/haŭtkoloron ne estas formulitaj tiel klare kiel en ĉi tiu pli posta versio.

Se tio veras, la aserto, ke Helenino estis helspeca, bazas sur postaj eŭropanciaj tradukoj, kies aŭtoroj aldonis al Helenino tiujn atributojn, kiuj tiam estis ligitaj al beleco.

Konklude: Mi ne opinias, ke tio ŝanĝus ion ajn, ne por la reĝisoro, ne por mi, ne por rasistoj. Tamen, mi ankoraŭ atendas al iu kiu povas montri al mi en greka originala teksto (la plej frua peco travivinta estas miascie el ĉ. -300) ke ŝi estis helhaŭta, helhara kaj bluokula.

bearbeitet 23:20 ✓

Finiĝo

La enigmo de la monato rilatas al la supra filmo kaj Homera verko. Vi dekstre vidas bildon el la filmo, sur kiu estas montrata Odiseos kaj la greka diino Ateno, kiu en formo de homo vizitis Odiseoson kaj ties filon, Telemaĥos, por subtenadi ilin. La enigma demando por tiuj, kiuj legis la Odiseadon aŭ aliokaze konas ĝin, estas: Kio estas, rilate la diino, en tiu bildo malĝusta?

Solvo de la kvizaj demandoj de la lasta ei:

1 En kiu jaro kaj kie okazis la unua, ankoraŭ ne oficiala, internacia Esperantokongreso?

En 1904, unu jaro antaŭ tiu oficiala en Bulonjo. Partoprenis tiam nur angloj, francoj, kaj unu ĉeĥo.

2 En kiu jaro fondiĝis la Esperanto-Societo Frankfurto? *En la sama jaro, 1904.*

3 En kiu jaro estis la Fundamento de Esperanto dum UK aprobita? *En 1905 en Bulonjo.*

4 Zamenhof dufoje vizitis Frankfurton kaj poe faris publikan prelegon. En kiuj du lokoj li faris tion?

Li publike parolis, je du sinsekvaj jaroj, ekde balkono de la „Steinernes Haus“ kaj en la granda salono de la „Palmengarten-Gesellschaftshaus“.

5 Kiel nomiĝas la iama prezidanto de nia ESF kiu savis dum la Nazia tempo, kiam Esperanto estis malpermesita, la bibliotekon de la klubo en sia hejmo? *Estis la tiama klubestro Carl Barthel.*



Diversaĵoj

Ŝerco

La anatomiprofesoro al la studento:

"Kiu parto de la homa korpo okoble pligrandiĝas kiam ekscitita?"

Ŝi ruĝiĝas kaj balbutas: "La..., la..., hm..."

"Malĝuste, la pupilo," respondas la profesoro.

"Mi konsilus vin, fraŭlino, ne edziniĝi kun tro altaj atendoj."


Proverbo de la monato (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon, kiu temas pri la ĝustatempa agado aŭ faro

„Por ĉiu faro estas horo“

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002020.htm

la okuloj vidas nur tion kion
la menso pretas kompreni



Esperantaĵo

Novaĵo:

La 20a datreveno de la Esperanto-urbo

La 25an de julio 2026 la urbo Herzberg am Harz festis sian datrevenon kiel la Esperanto-urbo. Legu prian artikolo de Julia Mul en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” <https://sezonoj.ru/2026/07/germanujo-47/>

Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en aŭgusto 2026

Antaŭ 85 jaroj, la 1an de aŭgusto 1941 naskiĝis Torben Kehlet, dana entreprenisto kaj esperantisto, kiu eldonis dekojn da gravaj Esperanto-libroj kaj la revuon “Monato” en ties unua periodo. Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por aŭgusto 2026, kompilitan de Aleksander Korĵenkov en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” <https://sezonoj.ru/2026/08/augusto-5/>

Forpasis Martin Stuppnig

La 16an de aŭgusto en Arnoldstein (Aŭstrio) forpasis Martin Stuppnig (1925-2026), honora membro de UEA. Pasintjare li iĝis 100-jara. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2026/08/gk-321/>



ESPERO (AMAL, HOPE, MATUMAINI KTP.) de Wolfgang Günther

- Espero estas homa eco. Ĝi koncernas homajn individuojn kaj homajn kolektivojn - La vorto "espero" devenas de la pralatina vorto "speh", kiu signifas "prosperi" aŭ "suk- cesi. - Espero laŭ Vikipedio signifas: "Fidoplena interna direktiĝo kun pozitiva ekspektemo, ke io dezirinda realiĝos, ĉu iu okazo aŭ iu baza stato

– sen efektiva certeco pri tio. Espero estas la emocia kaj agodirekta aranĝo de la homo al la futuro. Esperante, la homo kondutas optimisme koncerne la limigitecon de sia ekzisto."

- Espero estas homa konstanto. Ĝi rilatas al libereco. Espero signifas, ke la aferoj povas esti aliaj, povas ŝanĝiĝi aŭ esti ŝanĝataj. Homoj havas senson pri tio en la kerno de siaj pensado kaj sentado kredi je tio. La kontraŭo de espero estas timo.

- Kiu malsanas kaj havas esperon, jam survojas al saniĝo. Oni diras, ke espero kaj ĝojo estas la plej bonaj kuracistoj. Espero en ĉiuj situacioj de sufero, mizero, sortopremo ĉiam estas la komenciĝo de pliboniĝado.

- Espero reala ĉiam ligiĝas al volo/impulso agi/formi, ĝi estas centra forto por la formado de la futuro, kiu unue devas esti agnoskata kiel malfermita. Kiu plene rezignas, forprenas al si la liberecon formadi la estontecon. Ĉi-sence politikistoj ofte parolas pri sia "ordono formi la futuron".

- Imanuel Kant starigas jenajn demandojn: 1e. Kion mi povas scii?, 2e. Kion mi devas fari? kaj 3-e. Kion mi rajtas esperi? Ĉi demandoj estas universalaj. La demando pri la scioj traktas eblojn kaj limojn de perceptado kaj (ek)konado. La demando pri la farado/agado okupiĝas pri la etiko, pri valoroj kaj moraloj koncerne la formadon de la individua kaj kolektiva vivo. Kaj la demando pri la espero koncernas nian ekziston kaj ties sencon kaj intime rilatas al la fakto, ke nia vivo estas limigita, havas

finon. La tipaj demandoj ĉi-rilate estas "De kie ni venas?" kaj "Kien ni iras?" La objekto de la espero estas por Kant la sukcesa koincido/efektivigo de la etiko/moralo (laŭ la dua demando) en daŭrema/daŭri- pova realo.

- La espera homo ne estas naiva optimisto, kiu simple ignoras la eblon de fiasko. Li vivas, konsciante pri la konstantaj minacoj kaj la konstantaj bonŝancoj. La miloj da migrantoj, kiuj volas al Eŭropo, scias tre intense pri ĝuste tio. Ili ofte akceptas malvenkojn kaj tamen rigardas la malsukceson kiel novan kaj bonan ŝancon.


- La germana filozofo Ernst Bloch kreis la koncepton de "la principo espero" kiel konkretan utopion. Devenante de la ĉiutagaj homaj deziroj kaj revoj, li konstatas: "La homa espero ĉiam montras aktualan mankon kaj ĉiam celas je io, kio ankoraŭ ne ekzistas, kio ja sur- vojas estiĝi." Kaj li koncize emfazas: "Gravas lerni la esperadon!" Ĉi-sence li komprenas la utopion ne kiel ĥimeron, sed kiel realan eblon.

- La kialoj por la estiĝo de Esperanto antaŭ pli ol 130 jaroj estis malpacaj okazintaĵoj, eĉ progromoj en Eostpollando, kiuj tre similis al la estiĝo kaj utiligo de helpkonceptoj por persekutatoj kaj migruloj hodiaŭ. Diskriminacioj kaj teroro estas ĉiam ankaŭ provokiloj por espero pri pli bonaj tempoj kaj ebloj.

- Kampe de monda komunikado Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo por ĉiuj trioble nutras esperon kontraŭ ĝeneralaj mankoj en la nuna merkato-profite globaliĝanta mondo - spite al ĉiuj etnaj lingvoj: 1-e. Koncerne kunvivadon: Ĝi kreas integran transkulturecon. 2-e. Koncerne egalecon: Ĝi kreas demokratian dulingvecon. 3-e. Koncerne biosferon: Ĝi kreas sanan vivmedion. Ĉi trajtoj intime konformas kun la tri gvidprincipoj de la UN, nome Paco, Homaj Rajtoj kaj Daŭripova Evoluigo kaj la Agendo2030.

Detala biografio ĉe la kompilinto. Kompilis okaze de la Tago de Zamenhof, 2018-dec-15:

Esperanto-Rondo Kassel en la Kulturinitiative Harleshausen e.V. – KIH (www.kih-kassel.de)
(w.guenther.esperanto@web.de)



Sincere, kiel homo al homo

